

### **VARSOVIA VENTO VIZITAS MADRIDON**

Dum tiu ĉi unua semajnfino vizitas Madridon parto de la skipo de la retradio Varsovia Vento (<https://www.podkasto.net/>), Irek Bobrzak kaj Agnieszka Mozer, kiuj deziras registri diversajn aktivadojn kun hispanaj verkistoj kaj aktivuloj. Ni do havos la ŝancon renkontiĝadi dum tiuj tagoj kaj paroli en Esperanto.

La ĉefan renkonton ni havos sabate la 1an de decembro, je la 5a vespere, kiam ni ĝuos la unuasabatan babiladon en kafejo de MediaLab Prado (strato Alameda 15), kun ĉeesto de niaj polaj amikoj.

La vendredon, 30an de novembro, en la sidejo de HEF, Irek parolis pri vortaro de plantoj en Esperanto. Oni eble programos aliajn renkontojn, pri kiuj ni informos per la sociaj retoj kaj forumoj.

### **JUNULARA RENKONTIĜO DUM LA FESTOPONTO**

Memoru ke la junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio, HEJS, organizas la “Benkontiĝon”, renkonton inter la 6a kaj 8a de decembro, profitante la ponton de festoj de tiu semajno. Ĝi estos neformala evento, por rendevui, amuziĝi, sin organizi kaj ĉefe paroli en Esperanto. La evento okazos en la junulargastejo Richard Schirrmann, ĝuste en la granda parko Casa de Campo de Madrido. Por koni pliajn detalojn kaj aliĝi, skribu al [hejs@esperanto.es](mailto:hejs@esperanto.es).



### **PREPAROJ POR LA ZAMENHOF-TAGO**

Por celebri la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, la sabaton 15an, MEL luprenos aŭlon en la kultura centro Centro Sociocultural Mariano Muñoz. Tiu loko estas ankaŭ konata kiel Asociación Vecinal La Cornisa <http://cornisa.org>. Ĝi troviĝas en la kvartalo Pradolongo-Usera, strato Cristo de Lepanto (metrostacio Almendrales, trajnstacio Doce de Octubre).

Ni disponos la lokon ekde la 11a matene ĝis la 6a vespere. La programo enhavos kelkajn prelegojn, inter alie de Félix pri la ĝisnuna sperto de la UNED-kurso, kaj de Toño pri la trovado de framasojn ligoj en siaj lastaj historiaj esploroj. Miguel Fernández prezentos siajn ĉijarajn librojn (Ha, Carmela; Rev-ene; Kio estas anarkiismo). Posttagmeze estas programitaj tabloludoj kaj poste praktika leciono de antikva meza egipta lingvo (Pedro Hernández).

Se vi emas prezenti al ni ion interesan, ankoraŭ eblas enprogramigi vin; kontaktu kun MEL. Ni disponos rimedojn por projekcii. Definitivan programon ni publikigos en la retejo de MEL.

Eblas tagmanĝi en la kafejo de la Centro; la tag-menuo kostas 10 € kaj konsistos el lentoj (vegetara) kaj bovida fileo, alternative omleto, sen plia elekteblo. Ĝi inkluzivas dezerton kaj kafon/infuzaĵon. Por partopreni la komunan tagmanĝon en la kultura centro Mariano Muñoz estas necese antaŭ-rezervi (skribante al Manolo Parra ĉe: <[manolo.parra \(ĉe\) yahoo.es](mailto:manolo.parra@yaho.es)>), elektante ĉu viandon ĉu omleton. Tempolimo por rezervi: sabato 8a je la 24a horo. Poste ne eblas aliĝi al la komuna tagmanĝo. Tamen, ekzistas en la ĉirkaŭaĵo diversaj manĝejoj.

Por tiuj, kiuj alvenos metroe, je la 10:45 staros homo kun verda flageto ĉe la elirejo de metrostacio Almendrales, lineo 3, por kune marŝi ĝis Centro Sociocultural Mariano Muñoz.

**NOVA EKSPozICIO KAJ PRELEGO EN FUENLABRADO**

Alia aktivaĵo kiu komenciĝos ĝuste en la Zamenhof-tago estos ekpozicio kiu estos montrita inter la 15a kaj 22a de decembro en la urbo Fuenlabrado, konkrete en la sidejo de la municipa oficejo de la kvartalo Loranca. Ĝi estos akompanata de inaŭgura prelego la 17an de decembro, je la 7a, kiun gvidos José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, Isidoro Ortega, prezidanto de la ĵus kreita loka grupo Fuenlabrada Esperanto-Ligo, kaj Carmen Seco, magistratano-prezidanto de la distrikto.

**PRELEGOJ EN NOVEMBRO**

Dum la lasta semajno de novembro estis programitaj en Madrido du prelegoj, hispanlingvaj, pri du malsamaj aspektoj de la historio de Esperanto. La lundon 26an, la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, prelegis pri “Esperanto, en la Dua Respubliko, en prizono kaj en ekzilo”, laŭ invito de la Asocio de Idoj de la Hispana Ekzilo. La evento okazis ĉe la universitato UNED, en la sidejo nomata Escuelas Pías, historia konstruaĵo en Lavapiés.

La ĵaŭdon 29an de novembro, profesoro Roberto Garvía, de la Universitato Carlos III, paroladis pri “Katolikismo kaj Esperanto; konverĝoj”, sine de seminario “Tito Brandsma, atestanto de espero”, dediĉita al tiu nederlanda karmelitano, esperantista, murdita de la nazioj kaj beatigita de la katolika Eklezio.

**VIZITIS NIN**

Dum la sabata rendevuo en MediaLab, la 10an de novembro, ni havis la okazon renkontiĝi kun la turka samideano Murat Özdizdar.

La ĵaŭdon 15an la hungardevena esperantisto Tony László kun sia japana edzino Saori (konata verkisto de mangao) kaj la filo Toninho (ankaŭ esperantisto) vizitis Madridon survoje al vizito al Barcelono, kaj renkontiĝis kun madridaj esperantistoj.

**KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ**

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. Atentu tamen ke pro la festoj kaj aliaj okazaĵoj en decembro ne ĉiujn lundojn oni malfermos la sidejon. Kontakti antaŭ ol veni al ĝi.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrid/](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/).

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [nivocho@gmail.com](mailto:nivocho@gmail.com)